# Sennaciulo

17a jaro. N-ro 12

DECEMBRO 1946

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

*Asocia sidejo de S.A.T. kaj administrejo: 67 avenue Gambetta, Paris 20.*
*Redaktoroj K. do L. Bannier, ĉe SAT, Parizo kaj Bas Wels 1a Wandeloorddwarsstraat 33, Rotterdam.*
*Eldonejo de SENNACIULO: C. van Essen, Floretstraat 10, ROTTERDAM, Z.*


*En AMERIKA ESPERANTISTO (majo—junio 1946) ni legis tre interesan leteron de japanaj esperantistoj, kiun peris iu usona soldato. Tial ni opinias, ke la represado de jena artikolo de K-do Lanti, aperinta en SATANA BULTENO (januare 1942), povas tre utili al nia afero. Estas ja tre grave, ke en Japanio oni eksciu, ke ne ĉiuj blankhaŭtuloj malestimas la flavhaŭtulojn.*

*Nun ne eblas rilati kun japanaj K-doj, sed espereble ne forpasos multaj jaroj ĝis renormaliĝos la poŝtaj rilatoj. K tiam la posedantoj de ekzemplero de ĉi tiu n-o de S-ulo povos havigi ĝin al japana korespondanto.*

*Krom tio la diroj de nia K-do, kiu vivis en Japanio dum 13 monatoj, estas certe meditindaj. Notinde estas, ke hispanlingva traduko de tiu artikolo aperis en la gazeto MENDOZA el Argentinio*

*— La redakcio —*

## POST OKDEK OK JAROJ.

En letero*, skribita en Japanio, la 29-an de julio 1937, mi diris, interalie, „... la sorto de l'homaro por 50—60 jaroj armile decidiĝos en Pacifiko dum pli malpli proksima estonto..." La 7-an de decembro 1941 komenciĝis la efektiviĝo de tiu antaŭdiro. Tamen la legantoj ne kredu, ke mi pretendas esti profeto. Tute ne! Ĉiu observkapabla homo, kiu konas iom la historion pri Japanio, povus diri la samon. Ni ekrigardetu al tiu ankoraŭ mistera lando, kiu mirigas nun la tutan mondon.

Laŭdire, en la fino de l' 13-a jarcento la italo Marko Polo vizitis Japanion. Li raportis, ke la lando estas tre malofte vizitata de negocistoj, ke la loĝantoj estas „paganoj, kulturitaj k bonaspektaj", ke tie abundas oro, kies eksportado estas malpermesita, k ankaŭ perloj.

Tia aserto estis sufiĉa, por veki ĉe eŭropaj aventuristoj la emon „eltrovi" Japanion. En la 14-a k 15-a jarcentoj senĉese blankuloj venis al japanaj insuloj. K inter 1549 k 1612 portugalaj k hispanaj misiistoj provis tie propagandi la katolikismon. Ili bone sukcesis, ĉefe en la sudaj insuloj Kjuŝu k Ĉugoku. En 1582 Itoo Joŝikata estis sendita al Romo por tie viziti la papon. Li estis la unua japano, kiu venis en Eŭropon. Sed poste okazis, ke fanatikaj katolikoj bruligis keikajn budaistajn templojn, k estis eltrovite, ke inter la „misiistoj" estis spionoj aŭ agentoj de fremdaj landoj. Tiel, en 1587, la tiama ŝoguno Hidejoŝi malpermesis la propagandon de la kristanismo k forpelis la misiistojn. De tiam neniu japano rajtis forlasi la landon k estis malpermesite konstrui ŝipojn, kapablaj navigi tre malproksime for de l'marbordo. Nur la ĉinoj rajtis veni en la landon. Tamen estis permesite al nederlandanoj resti kiel negocistoj en iu sola insulo izolita apud Nagasaki. Ili devis plie kraĉi sur biblion k treti krucifikson, kiel pruvon, ke ili neniel celas propagandi la kristanismon. Tiel dum *du jarcentoj* Japanio estis „Ermita Nacio" ...

* Leteroj de E. L., pĝ. 23.

# Pri JAPANIO

Sed iun nebulan matenon de julio 1853, la usona admiralo M. C. Peri kun *kvar militŝipoj* proksimiĝis al la Jedo-golfeto. Li portis proponon por komercaj rilatoj inter Usono k Japanio. La tiama ŝoguno Ijejoŝi ne malakceptis la proponon, sed petis tempon por pripensi la aferon. La vido de la grandaj kanonoj surŝipaj tre forte impresis la japanojn k la postan jaron, kiam revenis Peri — tiun fojon kun *dek ŝipoj* — por havi al la peto faritan respondon, tiam ĝi estis jesa: la du havenoj Ŝimoda k Hakodate estis malfermitaj al la usonaj ŝipoj.

Intertempe la franca fregato *Konstantino* estis bombardinta k detruinta du japanajn fortikaĵojn. Nur mallongan tempon post Usono, Britio ankaŭ akiris similan kontrakton komercan; poste Rusio, Francio k Nederlando same. En julio 1858, la unua ĝenerala konsulo usona skribis en sia notlibro: „Hodiaŭ mi hisigis la unuan flagon konsulan, kiu iam estis videbla en ĉi tiu lando. Grave pripensiga fakto. Aliĝo plena je konsekvencoj. Kredeble ĝi signas la finon de malnova periodo k la komencon de nova ..." K la unua vicambasadoro angla en Japanio skribis: „Japanio ... la polvo el insuloj, kiuj etendiĝas oriente ĝis la limoj de la horizonto k loĝataj, ŝajne, de groteska k sovaĝa raso". La opinio de rusaj k francaj konsuloj ne multe diferencis je tiu de la angla diplomato.

La usona konsulo pli saĝe intuiciis la gravajn konsekvencojn de la malfermiĝo de lando, kiu dum du jarcentoj, *per la volo* de siaj regantoj, restis ferma al la okcidenta influo. Sed la reganta klaso japana estis ekkompreninta, ke por rezisti al la „barbaroj" el okcidento necesas kelkrilate ilin imiti. Tial, jam en 1855, fondiĝis lernejoj, en kiuj estis instruataj ne nur lingvoj el Eŭropo sed ankaŭ la tiea scienco k tekniko. Plie, multaj junuloj japanaj iris al Eŭropo k Usono, por tie studadi k observadi ...

En la mezo de la antaŭa jarcento Japanio estis loĝata de 26 milionoj da homoj, k tiu nombro estis jam atingita ekde unu jarcento. Ĝi signis la maksimumon de loĝantoj, kiuj povis vivi en la lando. Tiam la infanmortigado estis deviga. La japanaj vortoj por nomi la infanmortigadon estas „higaeri" k „mabiku", kies signifo estas *liberigi, maldikigi* rilate al la kolektivo. Sed kiam la reganta klaso estis decidinta industriigi la landon, tiam la infanmortigado estis malpermesita k la loĝantaro kreskis laŭ proporcio je 31 % jare. Tial ke nun en Japanio mem estas proksimume 70 milionoj da loĝantoj k en la tuta imperio, t.e. kun Koreio k Formoso, ne enkalkulanta Manĉukuon, estas proksimume 100 milionoj ...

La rakontoj de Marko Polo pri la riĉaĵoj de Japanio estis tute fantaziaj. Fakte ĝi estas malriĉa lando, kie estas nek oro, nek fero, nek aliaj gravaj mintavoloj. Preskaŭ ĉiuj mineraloj posedataj de Japanio troviĝas en Koreio, Manĉurio k Formoso. Importado k eksportado estas jam de multaj jaroj nepre necesa vivrimedo por tiu superloĝata lando. Tial la japanaj varoj jam delonge komencis invadi la tutan mondon, tial ke pro la malalta vivnivelo de l'japana popolo ili estas produktataj tre malkare. En la malmulte industriigita k multe loĝata Ĉinio, troviĝas vasta merkato. Sed Britio k Usono jam de multaj jaroj klopodas por ĝin monopoligi. K la marioneto Ĉang-Kaj-Ĉek helpas en tio. Jam de pli ol kvar jaroj ĉinoj oferas sian vivon ĉefe por la interesoj de l'brit-usona plutokratio. Sed nun britoj k usonanoj devas mem partopreni en tiu fia ludo sangoplena. Okdek ok jaroj post la vizito de Peri al la *Lando de l'Sunleviĝo* la tieuloj venis siavice kun militŝipo viziti usonanojn k postuli, ke la mondmerkato estu malfermata al ili. Mi diris „postuli", tial ke jam delonge ili petis tion ...

La postulmaniero estis tiel elokventa, ke ĝi mirigis la tutan mondon. Blankhaŭtuloj apenaŭ povis kredi, ke flavhaŭtuloj kapablas tiel lerte argumentadi. Nu, ne necesas esti profeto, por antaŭdiri, ke ni eniras periodon, dum kiu oni vidos la rolon de l'blanka raso, kristanisme saturita, pli k pli malgraviĝi. La ĉinoj k hindoj ne estas malpli inteligentaj ol la japanoj k same kiel ili kapablas asimili la teknikan civilizon (mi ne diras *kulturon* tial ke popolo povas esti tre civilizita teknike k tamen nekulturita) per kiu ĝis nun superregadis okcidentanoj. Se la blankhaŭtuloj ne kapablas kompreni, ke la tuta tero devas aparteni senescepte al ĉiuj teranoj, ili riskas esti fine superregataj de l'flavhaŭtuloj, kiuj estas la pli multaj sur nia planedo.

Mi ne estas fakulo rilate al militaj aferoj k sekve ne havas opinion pri la venkoŝancoj de Japanio aŭ de la anglosaksa plutokratio. Sed, eĉ se la japanoj malvenkus, tio ne ŝanĝus la donitojn de l'problemo. Iel aŭ aliel Ĉinio imitos — jam komencis — Japanion, t.e. alprenos la okcidentan teknikon. Grandega revolucio, plena je tre gravaj konsekvencoj, okazis lastatempe en la menso de l' ĉina popolo: ĝi fariĝis patriota, militema. En la pasinta tempo la ĉinoj rilatis al militistoj kun malestimo. En la ĉina lingvo la ideografo por signi banditon, ekzekutiston k soldaton estas la sama. Sed jam de pli ol kvar jaroj multaj ĉinoj „heroiĝis" k nun la soldatoj estas glorataj. Jes ja, grava, gravega revolucio!... Venos tempo, kiam la ĉinoj ne plu estos obeemaj al Usono k Britio. Oni ne devas forgesi, ke la hodiaŭaj aliancanoj povas esti morgaŭaj malamikoj. Dum la antaŭa milito Japanio batalis kontraŭ Germanion aliance kun Britio, Francio, Italio k Usono. K nun ...

(daŭrigo sur paĝo 4)

**La Redakcio deziras al vi ĉiuj prosperan jaron.**
**Batalu por niaj ideoj k restu fidelaj al S.A.T.**

# OFICIALA KOMUNIKO PRI LA KOTIZO 1947.

Nia ĝisnuna tabelo de kotizoj estas evidente ĥaosa! En decembro 1945 ni ne povis alion fari ol ŝanĝeti kelkloke la antaŭmilitajn kotizojn, malgraŭ tio, ke kompare je 1939, profunde perturbitaj estis la naciaj ekonomioj k ankaŭ ilia rilato kun la naciaj monoj.

Por korekti, diversaj solvoj prezentiĝis al ni; la plej justa estas tiu, kiu bazas ĉie sur la salajro por la sama nombro da horoj de laboristoj el la sama kategorio.

Konsiderante la amplekson de niaj elspezoj en Paris (administracio) k Roterdam (presado) ni juĝis ke la jara kotizo devas esti egala je kvinhora salajro minimuma por nekvalifita laboristo en la ĉefurboj. Ni do sendis cirkuleron, la 17. de septembro, al niaj landaj perantoj, k el la ricevitaj respondoj ni aranĝis la ĉi suban tabelon.

Ni signis per steleto * la landojn el kiuj ne ankoraŭ venis la petita informo, aŭ kun kiuj ni plue korespondas, ĉar la unua respondo ŝajnas al ni necerta. En proksima numero ni publikigos, esperebIe, kompletan tabelon.

Kompreneble, laŭ tiu sistemo, la respektivaj valutoj, en oro, de la diversaj kotizoj, diferencas inter si; al tiu konstato ni rebatu ke: 1°) la kotiz-mono akumulita en kelkaj landoj havas aŭ havos valoron preskaŭ nulan, ĉar tie blokita por longe, - 2°) la relative alta kotizo de la anoj en „bonfartaj" landoj kompensos la perdon, kiu rezultos por ni el la malbonvalutaj landoj. Tio estas reala solidareco! k cetere tiel ĉiuj anoj oferas la saman proporcion el sia enspezo.

Ni starigis denove la „familian kotizon", t.e. en familio entenanta 2 SATanojn aŭ pli, nur unu pagos la plenan kotizon, la ceteraj duonan kotizon, sed al la familio ni liveros nur 1 gazeton k 1 jarlibron.

Insiste ni petas la membrojn pagi akurate la kotizon, prefere jam en januaro, al siaj respektivaj perantoj. Se en januaro aŭ februaro ni altigos la kotizon de la landoj signitaj per steleto sur la tabelo, la tieaj membroj bonvolos pagi la pluson!

Al la ne-pagintoj ni ekspedos la gazeton nur ĝis la februara numero inkluzive.

Fine ni konfirmas jenon: la stato de niaj arkivoj ne ebligas ke ni retrovu ĉiujn matrikulojn; ni tamen redonos la iaman matrikulon al tiuj, kiuj indikos ĝin al ni ...

— La P.K. de S.A.T. —

## KARA KAMARADO!

**Ĉu vi jam pagis vian kotizon por 1947 k ĉu vi jam varbis unu membron? Ne prokrastu k konsciu, ke la prospero de S.A.T. estas la prospero de la laborista esperantismo.**

# Listoj de niaj cefaj perantoj k tabelo de la kotizoj por 1947.

**Alĝerio.** Kdo Raymond MOULIN, chez Mme Cazes, 12 rue Diderot, **Alger** ........... 150 f.f.

**Argentinio,** Kdo José Maria DURAN, Casilla Correo 1802, **Buenos Aires** ................. *8 pes.

**Aŭstralio.** Kino Anna C. HINTZE, 17 Mayfield, **St. Coburg** N. 13, Victoria ......... *7½ ŝil.

**Aŭstrio.** Kdo Ludwig SAGER, Maderspergerstr. 14, **Wien-XVI** ........................... *4 ŝil.

**Belgio.** Kdo G. BASTEELS, 190 rue de Monténégro, **Forest-Bruxelles** (poŝta konto No. 252523) 60 f.b.

**Brazilio.** Kdo Roberto das NEVES, ĉe Esp. Klubo, str., Aranjo Porto Alegre 36, **Rio de Janeiro** *40 krz.

**Britio.** Kdo O. MELTON, 19 Brentwood Grove, Great Barv., **Birmingham-22-a** ......... 7½ ŝil.

**Bulgario.** Kdo Pantelij Stojanov ĈUMAKOV, str. Morava 89, **Sofio** ........................ 300 lev.

**Ĉekoslovakio.** Kdo Josefo PATERA, Dvorakova 24, **Pilzen** ........................ 40 kiŝ.

**Ĉilio.** — vakas

**Danio.** Kdo R. JORGENSEN, J. P. Jacobsensvej 59, **Aabyhoj** ........................ 8 kr.

**Finnlando.** Kdo Joel VILKKI, **Somero** ... 150 fmk.

**Francio** ĉe S.A.T. 67 av. Gambetta, **Paris** 20 (poŝta konto N. 1234-22-Paris) ...... 150 f.f.

**Germanio.** — por tuta **Germ.:** Kdo Ludwig PUFF, Am Ebelfeld 249, **Frankfurt a/M. Praunheim** (16) ........................ 4 Rmk.

— aparte por la brita zono: Kdo E. SCHMIDT, Hirtenstr. 6, **Dortmund (21-a)** ......... 4 Rmk.

— apatre por la usona zono: Kdo Hermann WAGNER, Im Himmelsberg 10, bei Neuffer, **Stuttgart-14** ........................ 4 Rmk.

— aparte por la franca zono: Kdo Julius MATHES, Sternwaldstr. 5, **Freiburg i/B. 17-a** 4 Rmk.

— aparte por la soveta zono: Kdo Paul KÖCKERITZ, Klopstockstr. 56. III, **Dresden A. 29** 4 Rmk.

**Hungario.** Kdo J. MODRA, Almos-u 51, **Pestszenterszebet** (poŝta konto No. 32.221) 8.30 for.

**Italio.** Kdo Mario GUZZI, Via Modena 33, **Torino** ........................ 180 lir.

**Japanio** — vakas

**Jugoslavio.** Kdo Premiy VJEKOSLAV, M. Stanivukoviĉa H. 1, **Osijek II** ........................ 60 din.

**Meksikio.** Kdo Jozefo SERANO, Central de Palabarteros 72, Col. E. Carranza, **Meksiko D.F.** ?

Nederlando. Kdo Bas WELS, 1e Wandeloorddwarstr. 33, **Rotterdam** ........................ —

— por mondferoj: Kdo C. v. ESSEN, Floretstr. 10, **Rotterdam-Z.** ........................ 3 gld.

**Norvegio.** Kdo Jorgen ROSENDAHL, Helandsgata 63, **Oslo. 38** ........................ ***7 kr.**

**Nov-Zelando — vakas.**

**Palestino.** Kdo Eliezer WURZEL, P.O.B. 2171, **Haifa** ........................ ?

**Polio.** Kdo Albin PIOTROWSKI, Jasna 8, **Krakow** 140 zl.

**Portugalio.** Kdo João Trazao de FARIA, Rua José Estevao No. 26. 3° E., **Lisboa** ......... 36 esk.

**Sud-Afriko.** Kdo David DAMBE, P.O. Box 2418, **Johannesburg** ........................ *7½ ŝ.

**Svedio.** Kdo Justo BOBERG, Palmfeltsvägen 49, **Enskede** (poŝta konto No. 3815) ...... ***5 kr.**

**Svisio.** Kdo Auguste BAVAUD, Charmille 30, **Genève** ........................ *7 fr. sv.

**Usono.** Kino Myrthe R. DOUGLAS, P.O. Box 6475, Metro St., **Los Angeles 55,** Calif. *1 50 dol.

## Helpo al Sennaciulo.

K-do J. Zegerius, Amsterdam, 2.50 gld. — K-do Kaŝon, Eaubonne 50 ff. — K-do Ŝabrier, Paris, 106 ff. — K-do Deker, Sartruvil: 110 ff. — Eliaŝ, Salomin 150 ff. — K-do Laverre, Paris, 20 ff. — K-do Carre, Chatellerault, 100 ff.

# Frakcioj en S.A.T.

Gravan taskon havas antaŭ si la bolŝevikaj esp.istoj por veki ĉe siaj sampartianoj intereson pri la problemo de internacia lingvo k vastigan kampon por ties laboro reprezentas la diverslandaj komunistaj partioj!

Generale la kom.partianoj simpatias al la esperanto-afero sed estas nepre necese efektivigi fortan propagandon ĉe la Komunistaj Partioj por entuziasmigi niajn sampartiajn k.dojn lerni la interhoman lingvon Esperanto.

Kelkiuj asertas ke la komunistoj malsimpatias al la esperanta problemo k ke eĉ en kelkaj landoj kie tiuj partioj regas, la esperanto-movado estas malpermesata! Tio estas simple kalumnio!

Neniu kapablas nei ke en Polio k. Bulgario, kie la komunista partio ludas nun la ĉefan rolon, la movado esperanta multe pli floras ol en la antaŭmilita tempo!

En Sovetio, la movado silentadis dum kelkaj jaroj, ĉar tiam ĉiuj energioj estis necesaj por forigi la faŝistajn invadistojn. Sed nun, jam denove ekaperas lumradio k mi estas firme konvikita ke baldaŭ la tiea esperanto-movado reprenos sian antaŭmilitan potencon!

Bolŝevikaj SAT-anoj! Ni nepre bezonas restarigi nian bolŝevist-leninistan frakcion en SAT k iniciati viglan propagandon en nialandaj partioj! Estas necese do, eklabori pro tia entrepreno k ĝuste tial, mi decidis verki tiun ĉi artikolon k proponi kontakton kun ĉiuj, tion dezirantaj, por sukcesigi nian entreprenon! Sed, k ĝuste ĉitie kuŝas la plej malfacila afero, krom juna bolŝevikemulo, mi loĝas en lando, en kiu, *esti bolŝeviko reprezentas pli grandan krimon ol esti murdisto!*

Tial mi proponas ke en iu lando, kie oni povas libere propagandi por bolŝevismo, 2—3 SAT-anaj bolŝevikoj formu la *reorganizan komitaton* de nia frakcio k alvoku la ceterajn bolŝevikojn aktivantajn en SAT por interkontaktiĝo!

Ne misuzu la tempon! Vi kontaktu tuj kun unu aŭ du K-doj en via lando k instigu pere de S.ulo la ceterajn SAT-anojn bolŝevikojn kontakti kun vi per letere por restarigi nian frakcion kiu celos disvastigi per Esperanto, la bolŝevikajn instruojn de Lenin k Stalin!

POR BOLŜEVISMO PER ESPERANTO!

SAT-ano 21744.

## Liberecanaj Esperantistoj atentu.

Anarkistoj, liberaj komunistoj kaj ĉiuj liberecŝatantoj, aliĝu al la Komitato de Liberecanaj Esperantistoj.

Nia celo estas starigi Frakcion Liberecanan en S.A.T. En januaro ni aperigos bultenon tutmondan por igi la kontakton inter la liberecanoj ĉiujlandaj. Ni intencas kunveni dum la kongreso de S.A.T. Sendu raporton pri la situacio de la Liberecana movado en via lando kaj petu senpagan provekzempleron de nia bulteno al, Kdo Adriano, Koningstraat 481.v., Hago, Nederlando.

## ALVOKO AL ĈIUJ.

Verdikto kontraŭ kelkaj militkrimuloj fare de aliaj kulpuloj ne signifas kondamnon al milito.

Du mondbuĉadoj ne sufiĉis! Por pluekzisti, kapitalismo bezonas trian. Ĉu la proletaro ankoraŭ akceptos? Perfidinte pacon jam dufoje en jarcentkvarono, ĝi sin mem dufoje perfidis. Ĉu trian fojon? Almenaŭ ni, konsciaj proletoj, ni rifuzu! Ni ne rajtas resti pasivaj! Eĉ se ni ne plu esperus, nia klasa devo, nia homa digno ordonus al ni defendi pacon!

En la kadro de SAT-Amikaro (Francia L.E.A.) jam funkcias pacista frakcio. Ĝi celas:

1-e) propagandi pacismon en SAT,
2-e) propagandi esp-on inter pacistoj, k
3-e) partopreni la tutmondan militrezistadon.

Ĝi jam rilatas kun diverslandaj pac-asocioj, k esploras interalie la demandon pri enkondukeblo en ĉiu lando de la militserva rifuz-rajto. Volante iĝi vere tutmonda, nia Frakcio petas de vi, fratoj el ĉiu mondparto, aliĝojn, sugestojn k kritikojn. Ilin direktu al la provizora respondeculo:

BONIN, SNC,
21 rue de L'Eglise
FRAIZE (Vosges)
— Francio —

# Batalintoj por la Socialismo.

## MIĤAEL BAKUNIN.

### IV.

Tralegante la programon de la Alianco de la demokratia socialismo, ni konstatas, ke temas pri akra atako kontraŭ ĉiaj formoj de aŭtoritato k proprajo en la ekzistanta socia vivo, atako, kiu kondukas al k bazas sin sur konspiro kontraŭ la socia k ŝtata ordoj. Grandparte la Alianco celis esti sekreta organizo, sed flanke de tio, ĝi havis programon, kiun ĝi konigis al la publiko.

La sekreta organizo dividis la adeptojn laŭ diversaj gradoj. La ĉefa diferenco konsistis en la divido de internaciaj k naciaj fratoj. La internaciaj fratoj ne havas alian patrion ol la universalan revolucion, ne alian malamikon ol la reakcion. Ili malakceptas ĉian politikon de kompromisoj. Ili estas fratoj: ĉiu estas por ĉiu sankta. Ĉiuj devas havi revolucian pasion, „la diablon en la korpo". La revolucio estas por ĉiuj plej grava. Nur tre malofte ili rajtas rifuzi komision de iu komitato. La administra regularo de la sekreta Ligo konas tri specojn de komitatoj: la ĝeneralan komitaton, la centran komitaton k la naciajn komitatojn. La ĝenerala komitato konsistas el ĉiuj membroj aŭ el du trionoj el ili. Kune tiuj membroj formas la plenum-komitaton. La centra komitato dividas sin en centran oficejon k centran komisionon de kontrolo. La naciaj komitatoj konsistas el ĉiuj internaciaj fratoj en unu regiono. Nova frato estas akceptata nur se ĉiuj membroj de la nacia komitato konsentas k post aprobo de la centra komitato. La naciaj fratoj ne rajtas ignori la ĝeneralan aranĝadon de l' internaciaj fratoj. Ili rajtas dividi sin en kategoriojn. Kompreneble ankaŭ ili devas havi la diablon en la korpo.

La celo de la organizo estas la efektivigo k la plibaldaŭigo de l' universala revolucio. Oni celis la malkonstruon de ĉiuj ekzistantaj potencoj k la rekonstruon de nova socio sur la fundamento de libere asociita laboro, bazita sur la principoj de kolektiva proprajo, egaleco k justo. La revolucio estu internacia k universala. Nur tia ĝi povas sukcesi.

La revolucio devas detrui ĉion: ĝi ne lasu unu ŝtonon sur la alia! Sed oni atentu: la malbono ne troviĝas en la personoj, ĝi estas en la *sistemo*. Oni do estu pardonema pri personoj. „Ni — tiel Bakunin parolas en la Alianco — neas la liberan volon. La juro estas nur transakcio. Ĉiu homo estas la produkto de sia medio. La kriminala juro estas hipokritajo. Ne la krimulo estas kulpa. Kiam la socio ekzekutas iun, tiam ĝi plenumas murdon por sia propra defendo. Ni respektas la homon. Se dum iu ribelo multaj homoj estas mortigataj, oni vidu tion kiel la rezulton de uragano; ĝi estas fakto, ne morala, ne utila, ĝi ne efikas. Oni povis konstati tion per la gilotino de 1793: politika hombuĉado neniam detruas la partion, ĉar la potenco ne estas ĉe personoj, sed ĉe la institucio de la ŝtato k ĉe la individua proprajo. Tial oni devas ekstermi la ŝtaton k la proprajon. Ni estas la naturaj malamikoj de tiaj revoluciuloj, kiuj celas fondi novajn revoluciajn ŝtatojn, ĉar ja ankaŭ ili deziras denove aŭtoritaton."

Por ni — tiel la programo de la Alianco daŭrigas — la revolucio estas la elkateniĝo de la t.n. malbonaj pasioj. Ni volas la detruon de la publika ordo. Ni proklamas la anarkion kiel plenan manifestacion de la elkateniĝinta popola volo, el kiu la nova vivo per si mem burĝonos. Tiu revolucio devas radikale k plene neniigi la ŝtaton k ĉiajn instituciojn. En nia programo ni decidis la ŝtatbankroton, la nepagadon de lá ŝtataj ŝuldoj, nek de l' impostoj, la likvidon de l' armeo, de l' burokrataro, de l' polico k de l' klerikaro.

Tuj kiam la ŝtato estos renversita oni devas transformi la ĉefurbon en „komunon". Oni devas admoni la provincojn k komunumojn imiti tion. Tiel la revolucio devas disvastiĝi. Ĉiu revolucio politika do samtempe estu revolucio socia. Tial ke la revolucio estas plenumata de la popolo, necesas ke la gvidado restu ĉe la popolo. La direktado okazu ĉiam de malsupre supren. La nova patrio estu por ĉiuj la alianco de l' revolucio universala. Nenia diktaturo estu allasata. Anstataŭ tio regos la unueco de l' pensado k de l' revolucia gvidado. La organo de tiu unueco estos la sekreta k universala asociado de l' internaciaj fratoj."

Ĉi ĉio apartenis al la sekretaj reguloj de la Alianco. Sed la Alianco samtempe devis elpaŝi *publike*. Oni do faris programon por la publiko, en kiu oni klarigis, ke la Alianco estas ateisma, ke ĝi celas la egaligon de la klasoj k la likvidon de l' hereda rajto. Ĝi postulis por ĉiu infano la saman klerigon. Ĝi estis respublikema k opiniis, ke la ŝtatoj iom post iom devas malaperi. Ĝi do ne povis akcepti iun patriotismon aŭ rivalecon de l' nacioj. Post tio venis la reguloj de l' organizo: la kotizado de l' membroj, la taskoj de l' diversaj instancoj, k fine, ke la centra oficejo situas en Ĝenevo.

★

Ke Bakunin bezonis la hom-amasojn, estas kompreneble. Ĝis nun li ne havis ilin; la Internacio de Marks jam estis forta k vasta organizo en tiu tempo.

Bakunin havis la intencon uzi la Pac-Ligon por la disvastigado de siaj ideoj k plie li celis kun la Ligo aliĝi al la Internacio de Marks kiel sendependa potenco. Bakunin ne estis blinda koncerne la fakton, ke la Internacio daŭre kreskis k akiris pli da gravo.

En la dua granda kongreso de la Pac-Ligo en Berno (1868) ni vidas lin kvarfoje ekstari por defendi sian starpunkton k konsili kunagadon kun la Internacio. Li postulis, ke la Ligo okupu sin pri la interesoj de l' laboristoj k ke ĝi akceptu la principon de ekonomia egaleco.

„Tiom longe kiom ekzistas historio — li diris — ekzistas du klasoj: la ekspluatantoj k la multnombraj ekspluatatoj. Tiuj lastaj, la laboristoj, antaŭe trompitaj de religiaj promesoj, ĉiam restis la servantaj iloj. Nun ili unuigis sin en Internacio. Ili volas mem ĝui la produktojn de sia komuna laboro. La kongreso de la Ligo devas subteni ilin. La kongreso devas klare difini sian sintenon koncerne la laboristojn. Mi mem ne estas komunisto, sed kolektivisto. Tial mi estas kontraŭ la hereda rajto."

En dua parolado li esprimis sin pli detale pri la komunistoj, per kio li celis la adeptojn de Marks, kiuj akceptis la komunistan manifeston de 1847. Li diris, ke li malamas la komunismon, ĉar ĝi estas neado de la libero. La komunismo — tiel li diris — absorbas ĉiujn fortojn de la socio favore al la ŝtato, ĝi koncentrigas la proprajon en la manojn de la ŝtato. Mi postulas la likvidon de la ŝtato k deziras la organizadon de la socio de malsupre, laŭ la vojo de la libera asociado. La franca revolucio proklamis la politikan egalecon, sed tiu egaleco estas mensogo sen la egaleco ekonomia. Donu al ĉiuj infanoj de ilia naskiĝo la saman edukadon, la samajn rimedojn por vivi, k ĉiu klasa diferenco iom post iom malaperos.

En sia tria parolado li esprimis sin pri la religio. „Ne nur la kristanismo, sed ĉiu religio estas kontraŭ la homa etiko. En la nomo de l' moralo k justeco ni devas batali kontraŭ la religio. Tion komprenis la grandaj pensuloj el la antaŭaj jarcentoj. Ili sugestis humanismon k ateismon. Kiu deziras dion, tiu deziras la servutecon de la homoj. Vi do elektu el tiu dilemo. Necesas radikala, socia revolucio."

Tiel Bakunin parolis en la kongreso. Li celis doni al tiu kongreso alian animon. Sed ĉe la voĉdonado evidentiĝis, ke li apartenas al la malplimulto. De la 110 kongresanoj nur 30 akceptis lian radikalan socialisman programon. Inter tiuj, kiuj subtenis lin estis la fratoj Reclus, Fanelli k Jukofski.

Bakunin nun komprenis, ke li per la Pac-Ligo ne povas atingi sian celon. Tial li decidis kun siaj fidelaj adeptoj uzi la Aliancon por enpenetri la Internacion.

★

Bakunin ne estis blinda koncerne la konstantan pligraviĝon de la Internacio. Laboristoj el multaj landoj alfluadis. Iom post iom formiĝis kapablaj gvidantoj diversloke. De post la fondiĝo de l' Internacio emocio trakuris la laboristajn mediojn. Oni sentis la ekziston de l' Internacio kiel la aŭroron de l' emancipiĝo. Ĉe la laboristoj la figuro de Marks ricevis firman formon k reliefon. Estas vere, ke en iuj landoj la funkciado de l' organizo estis malhelpata, sed tio ne povis haltigi ĝian kreskon. Kompare kun tiu unuiĝo de la laboristoj la Pac-Ligo ne multe signifis. Ĝi konsistis grandparte el liberalaj demokratoj, k ne reprezentis realan forton.

Bakunin do forlasis kun sia frakcio tiun sensangan Ligon. Lian intereson havis la Internacio de Marks. Li celis enpenetri ĝin por ĝin transformi.

En septembro 1868 la Internacio kongresis en Bruselo, k jam antaŭ tiu kongreso Bakunin sukcesis membriĝi al la Internacio (centra sekcio de Ĝenevo). Tiel jam en Bruselo Bakunin venis kun proponoj kvankam li mem ne ĉeestis. Sed la kongreso ne atentis tiujn proponojn k ankaŭ ne deziris la kunfandiĝon de la Internacio kun la Pac-Ligo. Ŝajnis ke Marks provizore sukcesis izoligi Bakunin en la Internacio. Tamen la luktado inter Marks k Bakunin jam komenciĝis. La 15an de dec. 1868 la Alianco direktis sin al la Ĝenerala Konsilantaro de l' Internacio en Londono k petis aliĝon al ĝi. Marks tuj komprenis la celadon de Bakunin: formi organizon kun propra politiko en la Internacio. Li do malakceptis la peton. Sed Bakunin ankoraŭ ne cedis. Ree li direktis sin al la Ĝenerala Konsilantaro k demandis ĉu la Konsilantaro povas aprobi la ideologion de la Alianco. (Atentu, ke ne temas pri la sekreta Alianco.) Se jes, ĝi estus preta likvidiĝi por refondiĝi kiel sekcioj de la Internacio. La Ĝenerala Konsilantaro respondis, ke ĝi ne konsideras sin kompetenta juĝi pri la scienca valoro de l' programo de la Alianco, sed ke ĝi estus preta akcepti la Aliancajn sekciojn kiel sekciojn de l' Internacio se oni pretus ŝanĝi la terminon „egaligo" de l' klasoj per „likvido" de l' klasoj. K tiel Bakunin kun siaj adeptoj aliĝis al la Internacio. Sed la *sekreta* organizo de l' Alianco, kiun Marks tiutempe ankoraŭ ne konis, daŭrigis sian funkciadon. Ĝuste per tiuj sekretaj fadenoj, per tiu nevidebla retaro de sia interligiteco, Bakunin esperis akiri influon en la Internacio k forpreni la tutan gvidadon el la manoj de Marks.

Jam en la Bazel-a kongreso de l' Internacio (1869) evidentiĝis, ke la subtera laboro de l' Alianco jam profitigis Bakunin. Sed pri tio la venontan fojon.

(Daŭrigota)

Kompilis B.W.

---

**GEEDZIĜO**

**Geedziĝis la S.A.T.-anoj ELSE PETIG el Dortmund (Germanio) kaj JOHANO KUITERMAN el Emmen (*Nederlando*). La juna paro, kiun ni tutkore gratulas, loĝas nun en Emmen.**


## VERKOJ DE K.DO LANTI

**Vortoj de K.do Lanti . . . 192 paĝoj fr.fr. 60; - gld.**

**Leteroj de E. Lanti . . . 280 paĝoj fr.fr. 100; 2 gld.**

**NACIISMO . . . . . . 124 paĝoj fr.fr. 40; 0,75 gld.**

**For la Neŭtralismon . . . 32 paĝoj fr.fr. 10; 0,25 gld.**

**Mendu ĉe S.A.T. en Parizo aŭ ĉe k.do C. v. Essen en Roterdamo.**

# Situacio en Hungario post la liberiĝo el la Faŝista jugo.

Kiam la blekado de kanonoj kaj tertremigaj bruoj de bomboj iom post iom foriĝis de la ruiniĝita ĉefurbo Budapeŝto, tiam la homoj kun turmentitaj vizaĝoj kaj lacaj korpoj rampis el la keloj, kie ili vivadis dum multaj semajnoj, kiel talpoj.

La urbo reviglis de pacemaj homoj, kiuj nun klopodis organiziĝi por la forigo de plej freŝaj signoj de faŝista frenezo. Unue oni devis zorgi pri la entombigo de mortintaj soldatoj, kies kadavroj ĉie multnombre kovris la teron. Poste oni organizis la policon, por ke oni havu organizon, kiu defendos la personan vivon kaj havajon, por ke pli poste tiu organizo povu defendi la rajtojn kaj kreaĵojn de la laborularo. En tiuj tagoj la loĝantaro faris superhoman fortostreĉon, por ebligi la minimumon de primitiva vivo sur la ruinoj. La laboristoj ofte sen ia ajn laboriloj elfosis per nuraj ungoj la fabrikajn maŝinojn el sub la ruinoj. Post la longa deviga laborĉeso, nun jam estis tre urĝe komenci la produktadon, des pli, ĉar multaj fabrikmaŝinoj estis forrabitaj de la faŝistoj. La magazenoj kaj komercejoj ankaŭ estis tute malplenaj.

Tiel kaj sen io ajn la demokrataj organizoj transprenis la heredaĵon. Ĉie ruinoj kaj mizero. La tempo urĝis, en la urbo estis nek vitroj sur la fenestroj, nek pordoj sur la domoj. Sed multloke ankaŭ la tegmento mankis sur la domoj. Dum la atako al la urbo, tute konsumiĝis la manĝaĵprovizoj. Kaj minacis malsato. Gravajn malfacilaĵojn ni devis venki. Sed ni venkis ĉion dank' al niaj sinoferaj proletaj amasoj, kiuj komprenintе la historiajn tempojn senmanĝe kaj tamen ne plendinte faris fortostreĉajn laborojn dum monatoj, por ke ili povu fari la firman fundamenton de pli homa estonto por la hungara laborularo urba kaj vilaĝa. Organiziĝis memvolaj laborbrigadoj, kiuj entreprenis memvolan laboron por ebligi la fervojan transporton kaj vojaĝeblon. Specialaj grupoj estis organizitaj, kiuj klopodis ripari la difektitajn telefonliniojn. Aliaj ebligis la freŝan akvon por la loĝantaro riparinte la akvokondukilojn. Estis, kiuj faris la gaskondukilojn, por ke almenaŭ, kie ĝi estas nepre bezonata, tie oni povu ankaŭ ĝin uzi. Vigla aktiveco estiĝis ĉie precipe, kiam la komunista partio faris alvokon al aliaj demokrataj partioj, por organizi siajn vicojn kaj aktivigi ilin por la rekonstrua laboro. Post la publika ekago de la komunista partio ankaŭ la socialista partio komencis sian reorganizon kaj iom post iom ankaŭ la burĝa kaj kamparana partioj ekmoviĝis por esti pretaj je la grava konstrulaboro. La komunista partio iniciatinte la koalician laboron de demokrataj partioj, faris intertrakton, laŭ kiu ili faras novan sendependan popoldemokratan ŝtaton. Ĉio moviĝis malrapide. Nur la komunistoj esperis kaj agis firmdecide kiel tiuj, kiuj jam ne hezitas, ĉar ilia celo estas klara kaj delonge difinita, alten levi la popolon el profunda mizero al feliĉa paca vivo.

La fabrikposedantoj, bienposedantoj, princoj, grafoj kaj iliaj ĉiuspecaj servistoj, kiel oficiroj, ĝendarmoj kaj policistoj rifuĝis el la lando, okcidenten.

Fininte la konsekvencon de multjardeka rabado kaj trompo, kiujn ili faris en ĉiu rilato kontraŭ la laborularon. Tiel la fabrikoj kaj feŭdalaj bienoj /grandbienoj/ restis sen posedantoj, sen direktantoj, do senmovaj, malproduktaj. Kvankam tro urĝis la produkto.

Tiam la laboristoj en ĉiuj fabrikoj, en ĉiuj uzinoj, kie estas gravaj produktfaktoroj, kreis novajn organizojn, laŭnome: uzinkomitatojn, kies devoj estis anstataŭi la fabrikposedantojn kaj direktorojn, eventuale inĝenierojn, fari inventarojn pri la krudmaterialo trovebla en la fabriko, pri la produktitaj varoj eventuale estantaj en la fabrikaj magazenoj. Tiuj uzinkomitatoj agadas laŭleĝe. Ili nun estas tre gravaj organizoj, kiuj rajtas ĉiudirektan kontrolon fari en la fabrikaj mastrumado kaj administrado. Krome la demokratio kreis diversajn aliajn komitatojn por diversaj taskoj: nacikomitatojn, kiuj konsistas el delegitoj de ĉiuj partioj demokrataj laŭ ilia forto. Tiuj komitatoj agadas en ĉiuj urboj kaj en pli grandaj komunumoj. Ilia devo kaj laboro estas kontroli la urbajn magistratojn kaj helpi ilin en siaj taskoj. Estas terkoloniigaj komitatoj, kies taskoj estis mezuri kaj disdoni la grandajn princajn, grafajn, feŭdalajn kaj ekleziajn bienojn. Ekzistas popoljuĝistaroj, kiuj konsistas el unu kvalifikita juĝisto kaj kvar-kvin delegitoj el koaliciaj partioj. Iliaj taskoj estas juĝi pri la faŝistoj, rabistoj kaj kontraŭpopolaj krimuloj.

La agadoj de tiuj komitatoj estas multflankaj kaj gravaj. Ili estas gravaj, ĉar la reakciaj elementoj de la burĝaro eluzas ĉion eblan, por malhelpi la popoldemokration aŭ ĝian plifortiĝon. En la profunda mizero, kiun la faŝistaj banditoj faris en Hungario, la reakcia burĝaro dum malmulta tempo klopodas reakiri la posedojn perditajn dum la milito kaj sensente trompis kaj prirabis la laborularon. Kontraŭ tiuj parazitoj plej akre batalas la komunistoj kaj senindulge ili atakas ilin en la presorganoj prezentante iliajn agojn kontraŭsociajn. Sed la burĝaro, kvazaŭ estus blinda kaj surda, ne volas vidi kaj ne emas aŭdi, ke por ĉiam pasis la estinto kaj nova vivo komenciĝis post la faŝista barbarismo. Tiu ĉi nova vivo transformos la tutan hungaran socion ekonomie, politike kaj morale, kaj iom post iom levos la laborularon al la meritita homa vivo. La inflacio, kiu nun jam estas post ni, senekzempla estas en la tuta mondo. Sed kun forta volo ankaŭ ĝin solvis la popolo. El siaj propraj fortoj kaj ebloj ĝi kreis la novan monsistemon, sen ia ajn ekstera helpo. Nun jam la vivnivelo iom post iom pliboniĝas. Multe pli bona ĝi nun estas, ol antaŭ kaj dum la inflacio. Sed ankoraŭ longa tempo pasos, ĝis kiam la hungara popolo leviĝas el tiu profunda mizero, en kiun kontraŭ sia volo puŝis ĝin la perfidaj politikaj gvidantoj feŭdalaj kaj plutokrataj kun freneza politika blindeco.

Jam krepuskiĝas, la senlaca kleriga laboro iom post iom donas fruktojn, kaj niaj fortoj, niaj voloj ne vane estas aktivigataj por la komuna bono de la popolo.

Jozefo Ruzsits /Rujiĉ/

## La Majstro mortis.

Ne estis mi tie,
Preĝante plorpie:
Katenis min sklave Siberio.
La famon, ne brue,
Nur poste, malfrue,
Simile al eĥo de mortkrio
Mallonga sciigo alportis:
„La Majstro mortis!"

Sed scias mi sente,
Ke oni sensente
Plezurojn pelante babiladis,
Eĉ kiam plorante,
La ĉerkon portante
Amaso funebra trapaŝadis.
Mallonga sciigo alportis:
„La Majstro mortis!"

Por ili, jen, homo,
Eĉ malpli — nur nomo
Sin kaŝis por ĉiam en la ĉerko;
Por ni, funebrantoj,
Por pacbatalantoj
Ĝi gardas kreinton de Mondverko.
Mallonga sciigo alportis:
„La Majstro mortis!"

Júlio Baghy.

## Ĉu vi ŝatus ricevi belan Esperantan libron?

Bonvolu do certe partopreni nian konkurson!

Via Tasko: *skribu al nia radiostacio:*

1. Kion vi opinias pri Ĉeĥoslovakujo?
2. Kio vin interesas el nova vivo en Ĉeĥoslovaka respubliko?

Interesajn leterojn ni publikigos en ĉeĥa gazetaro. Ĉiu samideano, kies letero estos publikigita ricevos ekzempleron de la gazeto kun sia artikolo kaj Esperantan libron. Sed ni petas, skribu tute sincere! La respondoj ne devas esti longaj. Sufiĉas kelke da koncizaj, sinceraj frazoj. Ni ne dubas, ke vi afable diros pri tiu ĉi nia konkurso al viaj amikoj, eĉ al neesperantistoj, ke ni ricevu multe da respondoj kaj pruvu tiamaniere praktikan uzeblecon de Esperanto!!

Ni jam antaŭe al vi dankas kaj esperas baldaŭ ricevi vian ŝatatan leteron aŭ poŝtkarton.

Adresu al: *Radiostacio Ostrava*, Ĉeĥoslovakujo.

(daŭrigo de paĝo 1).

Ĉe la ekscio, ke iam la infanmortigado estis grandskale praktikata en Japanio, kredeble kelkaj legantoj pensos, ke tio signas barbarecon. Sed racie pensanta homo povus rebati, ke pli barbare estus permesi, ke ĵusa naskito senkonscia vivu dum pli malpli longa tempo k poste mortu pro malsato k mizero. Almenaŭ mi povas atesti, ke en Japanio la infanoj estas bone traktataj, eĉ dorlotataj, k ke la lernejoj estas bone prizorgataj.

Japanio estis jam kulturita, kiam eŭropanoj vivis en sovaĝa stato.

Ankoraŭ nun la japanoj havas la senton, ke ili estas pli kulturitaj ol blankuloj, kiuj eniras siajn domon k ĉambrojn kun ŝuoj ĉe la piedoj. La planko de japanaj domoj estas kovrita per matoj, kiujn neniam premas la plando de ŝuo.

Pri la grado de kulturo de blankuloj k flavuloj mi mencios du faktojn, kiujn proprokule mi povis observi. En 1914, kiam eksplodis la milito inter Francio k Germanio, mi vidis en Paris popolmasojn, kiuj sovaĝe disrompis la vitrojn de butikoj k magazenoj, kies montrofenestroj surhavis germanaspektan nomon. Mi estis en Japanio, kiam komenciĝis la milito inter Ĉinio k Japanio. Nenie mi vidis nek aŭdis pri scenoj similaj al tiuj viditaj en mia naskiĝlando. Tiam en Japanio estis almenaŭ 50.000 ĉinoj. En la kvartalo, kie mi loĝis en Osaka, estis relative multaj restoracioj ĉinaj. En ili ĉio funkciis kiel en normala tempo.

Verŝajne kelkaj legantoj miros, ke mi, sennaciisto, parolas simpatie al la japana popolo. Ili pensos, ke male, mi devus senti nur abomenon por lando, kie la amo al la patrio atingis la plej altan gradon. Tamen ne aliiĝis mia opinio, ke la patriotismo estas ia mensa malsano, ke la ekzisto de nacioj estas plago por la homaro. Sed mi penas prijuĝi racie k ne pasie, sente. K tion farante, mi pli facile komprenas la donitojn de l'problemo: malriĉa, inteligenta, laborema popolo sufokiĝas en siaj malgrandaj insuloj, dum tuta kontinento kiel Aŭstralio, ekz-e, havas apenaŭ 8 milionojn da loĝantoj, dum en la tuta Ameriko la loĝateco ankaŭ estas tre maldensa. Sed la nepre necesa ekspansio japana kolizias kun la Brit-Usona imperialismo. Ĉu, por solvi tiun problemon, la japanoj, anstataŭ militi, devus reapliki la devigan infanmortigadon?

La Versaja kontrakto generis la hitlerismon; la egoista konkeremo de l'blanka raso generis la nunan situacion en la Pacifiko. K tiel simile okazos tiom longe, kiom la riĉaĵoj el la tuta mondo ne estos je la dispono de ĉiuj homoj senescepte. Tiun aserton oni povas konsideri aksiomo. Ĉu la homoj iam kapablos ĝin kompreni k ties konsekvencojn tiri? Mi ne scias, k nun ne emas profeti. Prefere mi diru, ke per laŭcela praktikado de esp-o ni devas jam nun penadi por akiri menson de mondcivitano. En Esperanto regu ia patriotismo planeda...

Per tia penado ni povas almenaŭ ĝui la senton, ke ni mem ne havas respondecon en la naciecaj frenezaĵoj nunaj — k estontaj.

E. Lanti, 15 — 12 1941.

# Roosevelt kaj Usono.

Kiam *Franklin Delano Roosevelt* la 4an de marto '33 unuafoje paroladis kiel prezidanto de Usono pri sia „misio", la usona popolo jam amare spertis kien povas konduki la senbrida kapitalisma ekonomio, kiun oni en iuj medioj ankoraŭ konsideris kiel la motoron de netuŝebla kaj daŭre pligrandiĝanta prospero. Oni nombris komence de '33 en Usono inter 13 kaj 15 milionoj da senlaboruloj por kiuj ekzistis nenia leĝa subvencio. Centoj da bankoj jam fermis siajn giĉetojn, la terkulturistoj ne sciis kiel funkciigi siajn entreprenojn kaj inter la pompaj „ĉielskrapuloj" moviĝadis fluego da malsataj, mizere vestitaj kaj frostiĝintaj homoj. Regis amara animstato. Estis Roosevelt, kiu postulis tujan intervenon, tujan agadon. Antaŭ ĉio estis necese, ke la homoj ree povu eklabori. Kaj li venis kun sia „eksperimento", havanta alian celon kaj alian karakteron ol ĉiuj resanigaj agadoj de antaŭ la unua mondmilito, ĉar ĝi celis fari ordon en la socia vivo sub gvidado de la ŝtato.

Antaŭ ĉio la senlaboreco do devis esti grave reduktata. Pro tio necesis, ke plialtiĝu la prezoj de l' agrikulturaj produktoj, por ke la farmistoj povu pagi la produktojn de l' industrio. Por atingi tiun celon oni enkondukis novan mon- kaj kreditpolitikon. Ju pli kreskis la ekonomia aktiveco des pli da mono cirkuladis. Tiel oni pli vigligis la agadon de l' entreprenistoj kaj ĉe la agrikulturo la hipotekaj ŝuldoj iĝis malpli pezaj. La pli granda aĉetpovo en la kamparo plialtigis la aktivecon de l' industrio kaj reduktis la senlaborecon en la grandaj urboj. Laŭ tiuj kaj aliaj vojoj Roosevelt esperis levi la popolon el ĝia mizero.

La „New Deal" — kiun ni povas interpreti per „nova agado" aŭ „nova sistemo" — ne enternis nur novan mon- kaj kreditpolitikon, sed ankaŭ novan politikon por la agrikulturo, industrio kaj laboro. La rilatoj inter la ŝtato kaj la industrio estis reguligataj de la N.I.R.A. (National Industrial Recovery Act), kiu havis povon super la libera konkurenco per kontraktoj, ampleksantaj tutajn industriajn branĉojn. Per tiuj kontraktoj fiksiĝis la maksimuma labortempo, la minimumaj salajroj kaj prezoj, kaj leĝoj koncerne infanlaboron kaj konkurencon. Ekzistis antaŭ la dua mondmilito 500 de tiuj leĝoj (Codes of fair competition), kiuj ampleksis 15 milionojn da laboristoj.

En majo '35 la *„Supreme Court"* (la supera tribunalo) likvidis la N.I.R.A.-n, ĉar ĝi estis kontraŭleĝa; Roosevelt tamen daŭrigis sian laboron. Per la enkonduko de l' *„Labor Relations Act"* kaj la *„Social Security Act"* li sukcesis daŭrigi siajn N.I.R.A.-leĝojn laŭ aliaj formoj. La unua donis al la laboristoj la rajton organizi sin en liberaj sindikatoj, la dua fondis asekuron kontraŭ senlaboreco. La leĝa klaŭzo, kiu konfesis, ke salajruloj havas la rajton organizi sin kaj intertrakti pri kolektivaj kontraktoj per de ili mem elektitaj reprezentantoj, estis en Usono eble la plej grava el la tuta leĝaro. La sindikata movado ja estis en Usono pratempa. En la komencperiodo dependis de ĉies kapabloj kiel pioniro kiom alten oni sukcesis rampi sur la socia ŝtuparo. Kiu estis malriĉa, tiu ankoraŭ ne ricevis sian ŝancon aŭ jam fuŝis ĝin; kiu estis riĉa, ĝenerale akiris tiun riĉon post longa kaj peza laboro. Ne ekzistis do socia maljusto, kiun oni sentis tia. Posedi teron eblis por ĉiu pioniro. Pro daŭra alfluo de enmigrantoj la agrikulturo kaj industrio ricevis senĉese novajn merkatojn. Usono nombris en 1810 iom pli ol 7 milionojn da loĝantoj, en 1820 preskaŭ 13 milionojn, en 1850 23 milionojn, en 1870 proksimume 30 milionojn. En la jaro 1840 la fervojoj atingis nur ĝis la Alegejna montaro; en 1848 komenciĝis la *„goldrush"* al Kalifornio, en 1860 koloniiĝis la mezo, la *Corn Belt*. Tiel okazis, ke nur dum la unua mondmilito la sindikata movado en Usono akiris iom da signifo. Fondiĝis A.F.L. (American Federacion of Labor). En 1932 ĝi havis pli ol 2 milionojn da membroj. Sed ĝuste en la centroj de l' peza industrio ĝi ne sukcesis venki la *„company unions"*, la „flavajn" sindikatojn, fonditajn kaj subvenciitajn de la kapitalistoj mem kiel fabrikajn uniiĝojn por kontraŭstari la nedeziratan intervenemon de l' aŭtentikaj sindikatoj. Ankaŭ estas fakto, ke la A.F.L. iĝis pli kaj pli la organizo de l' plej bone pagataj laboristoj, la kvalifitaj laboristoj do, kiuj en Usono ne nur komencis konsistigi apartan socian kaston, sed kiuj ĝenerale havis ankaŭ alian nacian devenon ol la nefakuloj, kiuj estis grandparte Italoj, Slavoj kaj neblankuloj. Tiuj, kiuj apartenis al la pli altaj regionoj, preskaŭ ĉiam estis Britoj, Skandinavoj kaj Holandanoj.

Estis *John Lewis*, kiu batalis tiel kontraŭ la *company unions* kiel kontraŭ la organiza divido inter kvalifitaj laboristoj kaj nefakuloj. Krom tio li estis kontraŭulo de la sindikata strukturo laŭ la diversaj branĉoj de l' industrio (metalistoj, fabriklaboristoj, vitrolaboristoj k.t.p.). Li deziris organizon por ĉiu grava entrepreno kaj interligi tiujn organizojn en la C.I.O. (Committee for Industrial Organisation). Tiu C.I.O. havis antaŭ la dua mondmilito jam tiom da membroj kiom la A.F.L. (ambaŭ proksimume 3 milionojn) kaj sukcesis per aro da strikoj — i.a. en la potenca metal- kaj aŭto-industrio — forpuŝi la fabrik-uniiĝojn kaj akceptigi multajn kolektivajn kontraktojn.

Al ĉi ĉio la N.I.R.A. multe kontribuis kaj estas do kompreneble, ke Roosevelt havis ĉe la balotoj la subtenon de l' organizitaj laboristoj. Ankaŭ la negroj — kiuj antaŭ Roosevelt voĉdonis grandparte la respublikeman kandidaton, tial ke la blankuloj en la sudo ĝenerale estas demokratoj — donis sian voĉon al Roosevelt. Pro la unua mondmilito multaj negroj transiris de la agrikulturo al la fabrikoj en la grandaj urboj. Nuntempe eĉ 64% de la negroj laboras en la industrio kaj do loĝas en la urboj. Nur en Nov-Jorko, Ĉikago kaj Filadelfio loĝas en tute triono el la nigra loĝantaro de la nordaj ŝtatoj. Ankaŭ tiuj nigraj laboristoj profitadas el la leĝaro de Roosevelt, kies regado celis ankaŭ transponti la malegalecon inter la blanka kaj nigra partoj de la popolo. Jes, la moroj en Usono iĝis pli humanaj (sed pli en la nordo ol en la sudo), ĉar la statistiko indikas, ke inter la jaroj 1887 kaj 1896 1035 negroj estis linĉataj kaj inter 1927 kaj 1936 „nur" 134.

El la libro: Europa tussen de Wereldstaten.

# La ĥaoso en Eŭropo.

*Ni legas en la novembra numero de „ESPERANTISTA", revuo por Esperanto en Ĉeĥoslovakio, la jenon:*

*E-gazeto en Hungario estis malpermesita.* El Hungario venis informo: „Oni malpermesis la eldonon de „Sudhungarlanda Stelo", la sola E-gazeto, kiu aperis en Hungario post la milito. (Gia lasta aperinta numero estas la julia-aŭgusta). — Ni petas represi tiun informon en ĉiuj E-gazetoj. Estimplene Stefano P. Nagy, eksredaktoro, Gyula, la 15an de sept. 46." Ni turnas atenton de niaj legantoj al tiu ĉi tre grava sciigo. Rememoru, ke antaŭ du- tri monatoj oni fanfarone informis el Budapest, kvazaŭ madjaraj deputitoj disponigus hungarian parlamenton por kunvenoj, kiuj proklamas posedante por tio ian aŭtoritatecon enmeti Esperanton en lernejplanojn de publikaj lernejoj en Hungario. Kaj nun modesta revuo propaganda estas malpermesata, pro kaŭzo nesciigata al ni. Nia konsilo ripetata jam plurfoje: ne troigu! Persistu kaj estu singardemaj! Similaj sciigoj pri malpermesoj povas veni ankoraŭ el aliaj landoj. Tio ankaŭ dokumentas, ke ni estas „movado".

*Ni ne scias kion pensi pri tiu komuniko. Volonte ni ricevus informojn de niaj membroj en Hungario.*

*(Red.)*

**Estas vero, ke la nacionalismo de gentoj premataj — kiel natura sindefenda reago — estas multe pli pardoninda ol la nacionalismo de gentoj premantaj; sed, se la nacionalismo de fortuloj estas nenobla, la nacionalismo de malfortuloj estas neprudenta; ambaŭ naskas kaj subtenas unu la alian, kaj prezentas eraran rondon de malfeliĉoj, el kiuj la homaro neniam eliros, se ĉiu el ni ne oferos sian grupan memamon kaj ne penos stariĝi sur grundo tute neŭtrala.**

**El letero de Zamenhof; 30.6.'14.**

## KORESPONDADO

Deziras korespondi:

— Kdo B. Her'aar, Gibraltarstr. 42, **Amsterdam**, kun ĉiuj landoj.

— Kdino J. P. Leeuwen, St. Elisabeth Gasthuis, **Amersfoort**, Nederl.; flegistino, kun 18—25-jaraj gek-doj.

— Fraŭlino Violette Sezeu, 76 rue de Armentières, **Frelinghien**, Nord, Francio: poeto; dez. koresp. kun pentro-artistinoj en Bruselo.

— Kdo José Marques (kies antaŭa adreso estis: Rua da Armorika 24, **Barreiro**, Portugalio) komunikas sian novan adreson al siaj koresp.: Calle 33 No. 472, **Pa Plata**, **Argentinio**.

— Kdo Artur David, T. do Teatro No. 2, **Barreiro**, Portugalio: 17-jara, laboristo, dez. kor. kun gek-doj el ĉ.l. — Respondo garantiata.

— Kdo Teobaldi Roger, 37 Av. Gambetta, **La Seyne** (Var-, Francio. Precipe kun Svisio k Svedio.

— Kdo Jozefo Scalenge, v. Accademia Albertina 42, **Torino, Italio.**

— Kdo J. Kanij, Caan van Necklaan 202, **Rijswijk** (Z.H), Nederl. kun sampartiano (li estas juna komunisto) k alipensantoj el ĉiuj landoj.

— Kdo J. Zegel, (23-jara lab.) Oudeschild 257, **Texel**, Nederl. kun ĉiuj landoj.

— Kdo E. C. van Groningen, Nigel'estr. 38, **Amsterdam** N., Nederl. nur kun seriozuloj.

— Kdo Herbert Hauffe. Benroth Kappelerstrasse 10.III, **Dusseldorf** (22), Germanio.

— Kdino Olga Miller, Burgau 321, **Jettingenb** (13.b), Germanio.

— Kdo Huron Victor, 8 av. Paul Vaillant Couturier, Kremlin-Biĉetre (Seine) Francio.

— Kdo K. Florisson, Meidoornstraat 1, **Leiden**, Nederl. kun presistoj el ĉiuj landoj.

— Kdo J. L. Koene, Orteliusstr. 140, **Amsterdam** W. Nederl. Certe respondos.

— Kdo Modra Janos, Almos u. 51, **Pestszenterszebet**, Hungario: (landa peranto de SAT) ŝatus kontakti kun lab. esp. grupoj en la najbaraj landoj: Aŭstrio, Bulgario, Ĉekoslovakio, Jugoslavio, Rumanio, Sovetio.

— Dro Job. Kreutzer, Oberstudiendirektor, Karl Stielerstr. 4, **Frankfurt/M.** (16) dez. rilati kun fr. instruista sindikato.

— Dro fil. Ernst Happt, Stud. Rat. am Gymnasium, **Bielefeld** (21a), **Germanio, kun kolegoj** esperantistaj de supera franca lernejo.

— Kdo Jan Knegt, C. Vossenstr. 7, **Brunssum** L., Nederl. petas ekspozician materialon.

— Kdo J. Brinkman, Poppeweg 20. **Leeuwarden**, Nederl. petas informojn pri Zigmondo Popp, **kiu** loĝis en Budapest, Ulloi ut. (Hungario).

**Vojaĝo al ĉekoslovakio: kiu el Belgio, Britio, Francio, Nederlando, volas pasiĝi kelkajn semajnojn en Ĉekosl., ĉu turiste, ĉu por studi, ĉu por alia celo? Skribu al SAT (Paris) kiu konigos la kondiĉojn por solvi la valut-problemon.**

*KOMUNIKO DE LA P.K. de S.A.T.:*

Nia sekretariino, Kino Marcela, kies sano jam de kelka tempo ŝanceliĝis, kuŝas nun en hospitalo por nedifinita daŭro. Ni serĉas anstataŭantinon, sed ĉiaokaze tio perturbos la laboradon ĉe la SAT-oficejo, — despli ke tio okazas ĝuste kiam plej abundas la korespondado. Ni petas la kolegaron toleri paciencе tiun neeviteblan prokraston!